# *Raúl Castro kaj Díaz-Canel kondolencas al la argentinanoj pro forpaso de Maradona*



**Diego Armando  Maradona.**

Havano, nov 26 (RHK) Kondolenca letero estis sendita de la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel al la argentina prezidento Alberto Fernández.

 “Nome de la kuba popolo kaj registaro, kaj de la generalo de armeo Raúl Castro, mi sendas elkorajn kondolencojn pro la forpaso de Diego Armando Maradona, kara kaj fidela amiko de Fidel kaj de nia popolo”, skribis la kuba ?tatestro.

Maradona, stelulo de la argentina futbalo kaj kontinenta, subtenis la ka?zon de la kuba Revolucio ?is la vivofino. Li estis granda amiko de Fidel Castro kaj de Hugo Chávez, amba? gvidantoj de projektoj landaj progresemaj kaj kontra?imperiistaj.

La 28-an de julio 1987, Fidel akceptis la argetinan futbaliston en la Palaco de la Revolucio, invitite de la agentejo Prensa Latina por transdoni al li la Premion al la Latinamerika atleto pli elstara de 1986.

Estis la unua vizito al Kubo kiu akceptis lin elkore. Tiam li renkonti?is kun Fidel, unu el liaj idoloj, kiel li mem esprimis.

Maradona ?iam deklaris sian amon kaj respekton al Fidel kaj dankis plurfoje pro la subteno de li donita dum unu el la plej malfacilaj etapoj de sia vivo.

 “Mi sentas min kubano. Mi ricevis amon dum mia malsano. Mi levi?as ?iumatene kaj povas paroli a? doni tiun ?i intervjuon, kaj tion mi ?uldas al Fidel”, li tion konfesis la tagon, kiam li eksciis pri la forpaso de la ?efkomandanto, kiun li konsideris kiel dua patro.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/240820-raul-castro-kaj-diaz-canel-kondolencas-al-la-argentinanoj-pro-forpaso-de-maradona

**Radio Habana Cuba**